


LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO“

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 1,50 NED. GULDENO AŬ EGALVALORO.

Por progresintoj.

LA KVARPIEDAJ HELPANTOJ: MIA HUNDARO

(El: „Tridek jarojn en la ora nordo“ de Jan Welzl).

Ne nur la ŝipo, naĝanta sub la flago de filoj de la ora nordo, alportis ĉiujare grandajn sukcesojn al mia komerca entrepreno. Ne malpli grandan meriton pri miaj profito kaj bona komerca reputacio havis de post la komenco miaj hundoj, kies nombro pli-grandiĝis preskaŭ ĉiutage.

En la arktaj regionoj estas la hundo necesega, per mono nepagebla besto. Mi konis ekzemple en Alasko faman hundon, nomatan Looky. Temis pri pursanga lupo, kiu gvidis dum multaj jaroj la ĉefan poŝton. Ĝi sciis jam detale la teruran vojon, ĝi gvidis grandegan hund'jungaĵaron ĉiam eĉ sen plej malgranda eraro, eĉ se estis plej granda tempesto kaj la vojoj alte kovritaj de neĝblovaĵoj. Amerikanino, kiu vojaĝis tra Alasko por forpeli enuon, volis aĉeti la hundon kaj proponis — mi ne scias jam kiom — sed temis pri sumo, kiu estis altega, eĉ por la arktaj cirkonstancoj. Sed la posedanto de la hundo diris: „Eĉ se la tuta Usono kunmetus sian monon, ĝi ne ricevus la hundon!“

Ankaŭ aliloke mi vidis, kiel oni ŝatas bestojn en la nordo. Kelkfoje okazas, ke piedo frostvundiĝas al hundo. Eskimoj operacias ĝin kaj faras protezon¹⁾ al ĝi. Se oni forigas la piedon sub la

1) protezo = arĉa membro.

genuo, oni povas uzi tian hundon ankoraŭ por trenado, kvankam tio estas malagraba, ĉar la protezo eniĝas profunden en la neĝon. Sed se pro frostvundiĝo devas esti amputata la tuta kruro, la hundo ne taŭgas plu por trenado. Sed eskimoj lasas ĝin hejme por amuzo, dum ĝi vivas.

Kaj tia hundo, kvazaŭ ĝi sciis, ke oni indulgas ĝin pro kompatato, estas sindona, fidela, kaj kutime ankaŭ tre inteligenta kaj lernema. Ofte oni povas dresi ĝin tiel, ke ĝi ne estas aĉetebla eĉ por granda kapitalo. Se ĝi gvidas hundaron, ĝi estas tre akraŝanta kaj singarda, kaj, kio estas plej grava, ĝi obeas sian estron. Ĝi restas tie, kie estis ordonite, eĉ se ĝi estus pereonta pro malsato aŭ pro frostado. Tiel kompreneble ĝi malebligas ankaŭ al aliaj hundoj malobeemon aŭ eĉ forkuron. Tio estas granda avantaĝo precipe dum trarigardo de kaptuloj kiam ĉasisto devas foriri dum momento de la hundaro.

Blankuloj estas pli kruelaj al ĉi tiuj estaĵoj. Kiam ajn la besto grave difektiĝas, aŭ frostvundiĝas, oni tuj mortpafas ĝin. Se okazas, ke hundo atakas sian estron, blankulo tuj punas tian hundon per mortigo. Se iu hundo estas neplibonigeble batalaĉema, vivas kun neniuj en paco kaj atakas ceterajn hundojn en la aro, estas neniuj helpo ol mortigi ĝin. Sed alirilate fartas hundo ĉe arktuloj entute pli bone ol ĉe Eskimoj. La hundo de blankulo havas bonan nutraĵon kaj dum malbona vetero kaj plej grandaj tempestoj ĝi vivas en la groto; male eskimaj hundoj estas kaŝitaj nur en neĝaj tuneloj kaj okazis ofte, ke dum malmilda vintro Eskimoj perdis plejmultegon da siaj hundoj. En tiaj okazoj estis aŭdeblaj dum longa tempo nur hunda ulalado kaj sonorado de ĉenoj, ĉiam malpli kaj malpli forte kaj post atako de frostado kuŝis multaj hundoj mortaj. Kelkfoje ĉiuj.

Arktuloj havigas al si hundojn diversmaniere. Plej ofte tiel, ke ili mortpafas lupinon kaj forprenas ĝiajn idojn, kiujn ili bredas. Dum la unuaj tri monatoj ili forfrotas iliajn ungegojn en varmega akvo kaj blankaj arktuloj forfajlas regule la pintojn de la anguldentoj al ĉiu hundo. Eskimoj kutime ne faras tion kaj tial, se hundoj de blankuloj interbatalas kun eskimaj hundoj, la niaj ĉiam estas venkataj. Blankuloj eĉ elŝiras anguldentojn al lupoj. Ĉiun hundon, uzatan al trenado aŭ alia laboro kutime oni kastras.

Estas memkompreneble, ke hundoj de lupaj patrinoj restas rabaj bestoj, eĉ se ili estas ŝajne malsovaĝigitaj. Sed dum danĝeraj situacioj, kiam tia hundaro longe malsatas, arktulo devas gardi sin, ke li ne havu tiajn hundojn malantaŭ sia dorso; tiam ili tuj

atakas lin. Des pli frue ili faras tion, se oni falas. Neniam estas permesite doni al hundo-lupo nekuiritan nutraĵon. Dum la tuta vivo ili ricevas kuiritan maĵan farunon kaj kuiritajn fiŝojn, por ke ili ne sovaĝiĝu. Sed malgraŭ tio okazas tre ofte grandaj akcidentoj kaj malfeliĉoj. Ekzemple mi memoras, ke lupo-hundo, kiu estis bredata ĉe mamoj de eskima virino, ne forgesis, kiel ĝi estis nutrata kaj, kiam ĝi ekvidis iam ĉi tiun virinon ĝi atakis ŝin kaj formordis mamon al ŝi. La malfeliĉulino mortis pro sangoperdo. Eskimoj rakontis al mi, ke tiaj akcidentoj okazis jam ofte en la nordo.

En Alasko okazis ofte ke bankrotintaj orfosistoj dungigis sin kiel laboristoj kaj ne sciante, kion fari kun siaj hundoj-lupoj, ili liberlasis ilin, ĉar rapide ili kapablis nek vendi nek ludoni ilin. Kaj tial vagadis ekzemple en Nome kaj ĝia ĉirkaŭaĵo multaj hundoj sen posedantoj. Ili serĉis malespere ian manĝaĵon kaj fine ili atakis eskimajn infanojn, al kiuj ili terure formordis partojn de la vangoj; ankaŭ tiaj infanoj mortis kompreneble baldaŭ. Sed tial oni persekutis severe homojn, kiuj liberlasis siajn hundarojn kaj ne zorgis pri ili. Ni ribelis ĉiuj kontraŭ tiaj nekonsciencaj sentaŭguloj ankaŭ tial, ĉar niaj hundoj lernis diversajn maldecaĵojn de tiaj vaguloj.

Krom pursangaj lupoj oni uzis ofte rasmiksitaĵojn hundojn, kiujn oni aĉetis de hundovendistoj. Precipe bonaj trenbestoj estas miksuuloj de novofundlandaj hundoj kun lupoj. Ili trenas kvazaŭ ĉevaloj, sed relative ili estas multekostaj.

NAŬDEK RINOCEROJ KONTRAŬ CENTMIL ELEFANTOJ.

Laŭ takso de Novjorka instituto ekzistas sur la tuta mondo jam nur 90 rinoceroj, — cifero kiu ŝajnas tamen tro malalta. Ankaŭ la duvosta gnuo estas formortonta, ilian nombron oni taksas je 150 ekzempleroj. Eĉ da goriloj ekzistas jam nur kelkaj miloj. Sed la nombro da kameloj estas proksimume 5 milionoj, elefantoj cent mil, kaj tigroj minimume cent kvindek mil.

El „Heroldo de Esperanto”.

Milito ne estas naturkatastrofo, sed faro, al kiu la homoj decidas kaj kiu do estas evitebla, se ekzistas la deziro al tio.

Fridtjof Nansen.

NIA TUTMONDA FAMILIO.

..... Mi tre multe laboras kun junaj homoj, kiujn mi instruas en la latina lingvo kaj Esperanto. Mi instruis depost februaro 1919 pli ol 1.600 kursanojn. El mia tuta koro mi helpas la aŭstran TJO-peranton, J. L. Germela. Li estas 24-jara oficisto, kiu certe bonege plenumos sian oficon.

Nia ĝenerala kunveno de AEF (31.3) montris nian novan forton. La koncernaj ministroj (speciale pri instruado, la ministro-prezidanto kaj la ministro-esperantisto Dr. Frenzel) kaj multaj ŝtataj kaj urbaj eminentuloj estas **por** nia movado!!! La rektoro de la Altlernejo pri Mondkomerco estas nia AEF-honorprezidanto.

Dum majo-junio mi instruos Skolt-studentojn, kiuj estos kapablaj instrui mem depost septembro.

Mi faras al vi proponon: Kiam ree okazos regula Universala Kongreso de E. vi samtempe kun tiu kongreso okazigu la Junularan Kongreson E.-istan! Tiamaniere la gejunuloj pligrandigos la U.K.-on, kaj multaj el la U.K. pligrandigos vian kongreson. Vidu nian ekzemplon: AEF estas la tegment-organizo superpartia, kiu povas bone influi ĉiujn kompetentajn instancojn rilate „E.-to en la lernejojn!” Se socialistoj kaj aliaj (katolikoj, komunistoj, ktp) volas kunveni kun siajn samcelanojn, tio ne ĝenas! La ĉefafero por ĉiuj estas: Esperanto devas baldaŭ esti enkondukata!

Rudolf Michael Frey, ĝenerala sekretario de AEF. Wien, Aŭstrio (19-4-'46).

..... ke mi estas preta funkcii kiel peranto por TJO en Ĉeĥoslovakujo kaj fari ĉiujn necesajn servojn por ĝi, se vi intertempe ne trovis pli taŭgan personon. Bedaŭrinde ankaŭ mi estas treege okupita, kaj mia laboro por TJO povos esti nur minimuma.

Do mi akceptados abonojn por „LJV”, kolektos monon por ĝi, ĝis la moninterŝanĝo estos libera, klopodos fondigi junulargrupojn kaj aranĝi esperantan junular-interkorespondadon.

Jaromir Jermár, Praha III, Ĉeĥoslovakujo.

..... En la februara numero de „LJV” mi legis tre interesan artikolon de amiko Floor M.: „Pri nia organizo”. Mi plene konsentas pri ĉio kaj mi multe ĝojis. Pravege do agas TJO. Eble alian fojon mi volas skribi ankoraŭ kelkajn vortojn pri tio. Nun ne gravas, ĉar la organizo estas kaj iras sur la plej bona vojo.

Walter Kobelt, Rheineck, Svisujo.

Al la junaj TJO-anoj.

(Dum la printempa festo de „La Kampfloroj” aliĝis en W. Graftdijk 18 novaj anoj.

Sino v. Veenendaal jene alparolis tiujn infanojn):

Karaj geknaboj.

Ĉi tiu festo estas por vi ĉiuj tre grava! Ĉar hodiaŭ vi fariĝas anoj de la Tutmonda Junular-Organizo.

Ĝis nun vi vivis en malgranda familio, kun viaj gepatroj kaj gefratoj. Sed de nun vi lernos vivi en la Granda Rondo, en la Tutmonda Familio, al kiu ni ĉiuj apartenas. — Vi havas devojn kontraŭ via malgranda familio, sed vi ankaŭ havas devojn kontraŭ tiu Granda Familio. Kaj mi rakontos al vi, kiuj estas tiuj devoj:

Interamikiĝi kun infanoj el ĉiuj partoj de la mondo. Tion vi povas fari per korespondado. Por tio vi ja lernis Esperanton. Sed tio ankaŭ povas okazi, kiel vi ĵus vidis sur la filmo pri la Unua Internacia Junularkunveno en Groet: per partopreno en internaciaj kunvenoj. Ĉijare ni klopodas organizi tri kunvenojn, kaj mi esperas, ke vi partoprenos en unu el ili.

Via tasko ankaŭ estas zorgi, ke TJO fariĝas ĉiam pli granda! Por tio vi devas propagandi per viaj junaj fortoj! Kiam vi ree havos biciklon, zorgu, ke sur ĝi ĉiam flirtas la TJO-flageto. Ĉiam fiere portu vian insignon!

Tuj kiam ni ree povos eldoni nian nederlandlingvan propagandorganon „De Esperantist”, vi helpos en la kolportado, kaj varbos tiel simpatiantajn membrojn por TJO.

Sed antaŭ ĉio vi fervore studu, por bone ellerni nian lingvon!

En „La Juna Vivo” iam staris vera historio pri 2-jara itala knabeto, kiu ĉiam parolis Esperanton. Kiam tiu infaneto estis malobea, li deprenis sian Esperanto-insignon, ĉar oni instruis al li, ke malobeaj knaboj ne rajtas porti tion. — Nun mi esperas, ke vi ĉiuvespere en via lito pripensos, ĉu vi faris dum la pasinta tago vian devon kontraŭ nia Tutmonda Familio. Kaj kiam via konscienco diras al vi, ke vi faris nenion por tiu granda amikeco, tiam vi dum unu tago ne portu vian TJO-insignon. Certe la malplena loko sur via brusto instigos vin al laboro per duobla forto.

Tio estas la tasko, kiu vin atendas. Mi esperas, ke vi faros vian eblon plenumi ĝin kiom eble plej bone.

Kaj per ĉi tiuj vortoj ni akceptas vin kiel anojn de nia Granda Familio.

— Anoncante vin por TJO, bonvolu sciigi vian naskiĝdaton, aŭ almenaŭ aldonu ĉu vi estos ano aktiva aŭ subtenanta.

T.J.O.-RUBRIKO.

(Sokr. F. Meydam, Owenstr. 59, Leerdam, Nederlando).

Estrarkunveno. La 26-an de majo la estraro kunvenis en Amsterdamo. En tiu kunveno s-ino v. Veenendaal—Bouwes, redaktoro de „La Juna Vivo” esprimis la deziron, ekŝi el la estraro. Ŝia motivo estas, ke ŝi deziras eklabori por la Homaranismo laŭ konceptoj, kiuj transiros la esencon de supertendenca junularorganizo. Jam antaŭ unu jaro ŝi intencis cedi sian funkcion, sed ŝi restis, opiniante ke la rekonstruo de TJO antaŭ ĉio meritas ŝian atenton. Ŝi nun tamen opinias, ke la tempo venis, ke aliaj povas transpreni ŝian laboron, kaj ke ŝi nun kviete povos dediĉi sin al sia nova laboro. Krom tio ŝi laboros por TJO daŭre kiel ano.

La estraro, komprenante la motivojn de s-ino v. V.-B., akceptis la ekŝigon kaj decidis kandidatigi por la redakcio de „La Juna Vivo” f-inon N. Kool el West-Graafthijk, kiu ekde la fondiĝo de „LJV” asistis s-inon v. V. kaj lastjare, kiel ĉefino de la TJO-Centro praktike jam redaktis la gazeton.

Samtempe la estraro oficialigis la ekŝigon el la estraro de Jekke van Dijk kaj Job Kars (vic-sekretario). Jam tuj post la milito ambaŭ anoncis sian ekŝigon. La motivo de ambaŭ estis tempomanko. Ĉar la estraro esperis ke ambaŭ estraranoj post nelonge retrovos la entuziasmon por la junularlaboro, kaj ĉar, ĝisatendante la evoluon de la organizo, ne estis dezirinde elektigi novajn estraranojn per speciala enketo, la estraro tiutempe ne fintraktis tiun aferon, ĝi nun decidis kandidatigi por la funkcio de vic-sekretario Mary Kryt el Amsterdamo. La estraro nun konsistas el: P. Kryt, prez: F. Meydam, sekr: M. v. d. Horst, kasisto; W. Bant; H. Schut (filmservo).

Plue la estraro pritraktis la diversajn kunvenojn de ĉi tiu somero: vidu la koncernajn rubrikojn.

Ni kore bonvenigas jenajn novajn ĉefperantojn:

Aŭstrujo: Johann Leopold Germela, Thongasse 3/3/12, Wien III/40 (23-j.). Ĉeĥoslovakujo: Jaromir Jermár, Záběhlice, Jablonevá 23, Praha (24-j.). Samideanoj en ĉi tiuj landoj, turnu vin al niaj novaj ĉefperantoj por komune starigi viglan junularlaboron en viaj landoj!

Karaj Geamikoj

Nun, kiam TJO ree estas starigita, kaj estas same forta kiel antaŭ la milito, mi opinias, ke la tempo estas matura, ke mi povas retiri min el la redakcio de „La Juna Vivo” kaj la estraro de TJO, por tute dediĉi min al nova tasko: La batalo por la idealo de D-ro Zamenhof, la Homaranismo.

Kun ĝojo mi konstatas, ke vi ĉiam montris al mi sinceran konfidon kaj amon, kaj pro tio mi eldiras al vi mian plej koran dankon.

E. v. Veenendaal—Bouwes.

La Kunveno en Blankenberge (2-3-4-5 aŭg).

La programo aspektas tre alloga. Ĝi enhavas: prelegojn, ekskursojn al Brugge kaj al la marbordo, laborkunsidon, teatraĵetojn,

ludojn, kantadon, ktp. Ĉiu partoprenonto lernu ion por la programo, por ke ĝi estu kiom eble plej internacia! Ĉu vi jam posedas „La Juna Vivo“-kantaron? Se ne, baldaŭ aĉetu ĝin ĉe via landa libro-servo aŭ mendu ĝin rekte ĉe la TJO-Centro, ĉar ĝi estas nia komuna kantaro!

La partoprenontoj dormos en junulargastejo, tendo, aŭ ĉe Blankenbergaj gesamideanoj. Eksterlandanoj jam estos bonvenaj la 1-an de aŭgusto.

Oni kunportu: litkovrilon, manĝilaron, pokalon, banveston. Se vi havas tendon: kunportu ĝin! Ne forgesu viajn flagojn kaj insignojn.

La kongreskotizo estos 55 belgaj frankoj (f 3,50), post la 15a de julio 60 b. fr. (f 3,75). En tiu kotizo estas enkalkulitaj loĝado, ekskurso al Brugge, kaj ĝeneralaj kostoj. Trifoje tage oni en la akceptejo povos aĉeti manĝaĵpaketojn po 15 fr (3 bulkoj kun ŝinko) aŭ po 17 fr (3 bulkoj kun ŝinko kaj ovo). En ĉiu restoracio estos akirebla varma tagmanĝo por 60-80 fr (3,75—5 guld). Nederlandanoj povos pagi la vojaĝkostojn (vidu la antaŭan N. on de LJV) kaj kongreskotizon en Nederlando).

Bedaŭrinde la nederlandanoj ne povos vojaĝi per komuna pasporto.

Ĉiu partoprenonto do mem prizorgu pasporton.

Oni kiom eble plej baldaŭ petu aliĝilon, kiun oni tuj plenigu kaj resendu al Carlos Braet, Esscheboomstr. 1, Brugge, Belgujo. Nederlandanoj povas akiri la aliĝilojn ĉe la TJO-Centro, kaj ili bonvolu resendi ilin al Floor Meydam, Owenstr. 59, Leerdam. Tio necesas pro la vojaĝpreparoj. Anoncu vin do baldaŭ!

2-a listo da partoprenontoj:

Nederlandaninoj: 17. Sjouk Baarda (26-j.), Sanatorium K.P., Appelscha; 18. Jo Sieders (25-j.), Julianastr. 9, Hoogeveen.

Nederlandanoj: 19. Joĉjo Verstrael (24-j.), Vermeerstr. 156, Hago; 20. S-ro T. Aaldertsz, Edisonstr. 24, Wormerveer; 21. Rom v. d. Wal (22-j.), Zuiderkerklaan 13, Limmen; 22. Oene Hoekstra (25-j.), Koningsweg, Hippolytushoef, Wieringen.

Kunveno en Soesterberg (7—14 aŭg).

En la kunveno en „Kampoord“, Soesterberg, Ned. rajtas partopreni nur junaj TJO-anoj (ĝis 30-j.). La kostoj por la tuta semajno, ĉio enkalkulita estos f 17,50 (do ne f 15, kiel ni anoncis en la antaŭa No.). Oni anoncu sin kiom eble plej baldaŭ ĉe Mary Kryt, Veeteeltstr. 156, Amsterdam. Espereble ĉiu helpos en la pro-

gramo per kantado, muzikado, teatraĵetoj, dancado, ktp. tiel ke ĉiuvespere estos festa kunveno. Anoncante sin oni samtempe sciigu, kion oni povas prezenti! Jam nun lernu la kantojn el la „La Juna Vivo“-kantaro.

LA KANTO DE LA JUNULAR'.

Melodio: „Het lied der Vlaamsche Wandelknepen“ (Karel Candaël).

1.	Kaj suno en l'anim'; Dum en libera danc-motiv' Flirtadas la harar'. Ni man' en man' en kolektiv', Kantante iras al la viv', Ni, junular', ktp
Juneco estas nia flag', Espero nia fort'; Frateca estas nia ag', Amika nia vort'; Pacama nia gvidmotiv' Por tuta nia far'. Ni man' en man' en kolektiv' Kantante iras al la viv', Ni, junular', Tra kampo kaj arbar', Ni, junular', Tra kampo kaj arbar'.	3.
2.	La ĝojo de ĉi nova tag', La belo de l' natur', Alvokas nin al la imag' De l' granda aventur', Al la brilega perspektiv' De ni, la junular'. Ni man' en man' en kolektiv', Kantante iras al la viv', Ni, junular', ktp.
Ridantaj lipoj: beltrezor' De vivoĝoj' sen lim'; En sana korpo gaja kor',	F. V. Dorno (1-8-'39).

Ĉi tiu kanto estis dediĉata al T.J.O. okaze de la dua Internacia Junular-Kunveno en Tervuren (Belgujo). Jam tuj ĝi estis populara, kaj dum la kunveno eĉ estis elsendata per la radio. Ankaŭ en niaj postaj kunvenoj montriĝis la kanto tre ŝatata. Ĉiu TJO-ano lernu la vortojn parkere!

Solvo de la enigmo en No. 100.


Horizontale: I. Esperanto; II. zorgas — is; III. ole — j — akt; IV. ki — tablo; V. ostro — e; VI. tia — ŝlim; VII. mond — ioma; III. o — ei — r — it; IX. naturisto.

Vertikale: ezoko — mon; 2. solisto — a; 3. pre — tinet; 4. eg — radiu; 5. rajto — r; 6. as — a — ŝiri; 7. n — abelo — s; 8. tikl — imit; 9. osto — mato.

La solvon gajnis Ch. Le Séac'h, Loc Maria, Quimper, Francujo.

Ĉu vi jam propagandis la Esperanto-Petskribon? Se ne, TJO-Centro povas liveri al vi deklarojn por disdoni inter viaj geamikoj! Vizitu ĉiujn homojn en via ĉirkaŭaĵo. Kaptu la okazon propagandi nian lingvon!

ALIAJ OBJEKTOJ.



Ĉu estas aliaj objektoj en la ĉambro? Ho jes! Kiaj objektoj? Sur muro pendas bildo de la urbo Barcelono (Barcelona), sur alia muro pendas papera ventumilo kaj tiktakas la horloĝo. Super la malgranda tablo pendas du bretoj: unu kun kaseroloj kaj potoj kaj unu kun ladaĵ skatoloj. Super la granda tablo pendas la petrol-lampo.

Sur la tablo en la angulo staras malgranda petrol-lampo, petrol-kuir-aparato kaj laktujo. Sur la planko — apud la muro — staras la akvo-kruĉo kaj la oleo-kruĉo. En alta korbo estas pano! Ĉi estas la pan-uj-o. Sur la granda tablo kuŝas blanka tuko. Sur la tablotuko staras ses grandaj teleroj kaj du malgrandaj teleroj, akv-uj-o kun akvo, salat-uj-o kun salato, tomatoj kaj olivoj, sal-uj-o, ole-uj-o kaj vinagr-uj-o kaj kelkaj glasoj. Apud la ok teleroj kuŝas ok forkoj, ok kuleroj kaj du tranĉiloj. Sur la bufedo estas malgranda, kana korbo por fruktoj: ĝi estas la frukt-uj-o. Sur la komodo staras vazo kun floroj.

la uj-o ¹⁾

la akv-o	la akv-uj-o;	la petrol-o	la petrol-uj-o
la frukt-o	la frukt-uj-o;	la sal-o	la sal-uj-o
la lakt-o	la lakt-uj-o;	la salat-o	la salat-uj-o
la ole-o	la ole-uj-o;	la vinagr-o	la vinagr-uj-o
la pan-o	la pan-uj-o;		
ali-a(j)	la kaserol-o	la oliv-o	ĝi tiktak-as
la aparat-o	la kruĉ-o	paper-a	la tranĉil-o
la bild-o	kuir-aparato	ĝi pend-as	la tuk-o
la bret-o	la kuler-o	petrol-lamp-o	la vaz-o

la fork-o	lad-a	la pot-o	la ventumil-o
la horlog-o	la lamp-o	la skatol-o	
kan-a	la objekt-o	la tablo-tuk-o	

Ekzerco. Traduku kaj reesperantigu:

Kiu vi estas?	Mi estas Juano.
Kiu la sinjoro estas?	La sinjoro estas S-ro Delmonto.
Kiuj la knaboj estas?	Ili estas Joseo kaj Pio.
Kio estas hundo?	Hundo estas besto.
Kio estas mulo?	Mulo estas besto.
Kio estas abelo?	Abelo estas insekto.
Kio estas banano?	Banano estas frukto.
Kio estas fabo?	Fabo estas legomo.
Kio estas sunfloro?	Sunfloro estas floro.
Kio estas Pablo?	Pablo estas knabo.
Kio estas Anita?	Anita estas knabino.

Gramatika enhavo: la sufikso: uj; ripetado: kiu(j) — kio.

¹⁾ Vidu ankaŭ lecionojn 30+38.

Leciono 12.

LA ĈAGRENO DE GRACIA.



Gracia staras apud la benko en la legom-ĝardeno. Ŝi ploras, ĉar ŝi estas sola. *Kie* estas ŝiaj(!) patro kaj patrino? *Kie* estas ŝiaj fratoj kaj fratinoj? *Kie* estas Jipi kaj Mimi? *Siaj* gepatroj kaj gefratoj ne estas en la hejmo. Patro kaj Felipe estas en la montoj, Patrino kaj Pablo estas en la urbo. Ramono kaj Anita ludas kun Maria kaj Joseo en la ĝardeno de la najbaro. Gracia aŭdas, ke la geamikoj ridas. Gracia estas sola, sola en la granda mondo. Grandaj larmoj aperas. *Siaj* vangoj estas malsekaj. Luiza venas el la domo. „Kio estas kun vi, Gracia,” ŝi demandas. „Ĉu vi estas sola? Ne ploru! Iru kun mi.” Post kelkaj momentoj la du infanoj dancas mano en mano.

Luiza haltas. „Dancu, Gracia!” Ŝi nombras: „unu, du, tri, turnu Gracia. Unu, du, tri, haltu!”

Jipi venas el la stalo kaj kuras al la knabinoj. „Haló Jipi! Ĉu vi dancas kun ni?” Jipi sidas sur du piedoj kaj bojas. Jipi jesas.

„Venu, Gracia! La piedo de Jipi en via mano. Dancu, Gracia!”

Saltu Jipi! Hup, Hup!" La tri en la ĝardeno dancas piedo en mano.
Nun Gracia ne ploras; nun ŝi ridas.

ge

la amik-o	la amik-in-o	la ge-amik-oj	
la frat-o	la frat-in-o	la ge-frat-oj	
la knab-o	la knab-in-o	la ge-knab-oj	
la najbar-o	la najbar-in-o	la ge-najbar-oj	
la patr-o	la patr-in-o	la ge-patr-oj	
la sinjor-o	la sinjor-in-o	la ge-sinjor-oj	
ŝi aŭd-as	la hejm-o	mal-sek-a	salt-u
ĝi boj-as	ir-u	la mond-o	sek-a
la ĉagren-o	ĝi jes-as	ŝi nombr-as	sol-a
danc-u	ke	pied-o	turn-u
haló	kie	ŝi plor-as	la vang-o
halt-u	larm-o	plor-u	ven-u

Ekzerco. Traduku kaj reesperantigu:

La knabino dancas.	„Dancu Maria!"
La mulo haltas.	„Haltu Blekemul!"
La knabo iras al la kino.	„Ne iru al la kino, Juano!"
La infano ludas.	„Ludu Ramono!"
La hundo venas el la stalo.	„Venu Jipi!"
La knabino ridas.	„Ridu Gracia!"
La kato saltas.	„Saltu Mimi!"

Ekzerco. Respondu al jenaj demandoj: Kie estas Patrino? Ramono? Gracia? Blekemul? Mimi? La kaprino? Vi? Viaj gepatroj? Via amiko aŭ amikino?

Gramatika enhavo: la ordona modo de la verbo: u; la prefikso: ge; la korelativo: kie.

POR KOMENCANTOJ.

Pli bone.

Du knaboj sidas ĉe la flanko de la vojo. La pli granda el ili havas grandan pomon. Li formangas ĝin, kaj la alia knabeto ricevas neniom.

Preteriranto diras: „Kial vi ne donas pecon de via pomo al via frateto?"

„Ho," venas la respondo, „li ricevos la kernojn. Li povos semi ilin, kaj post kelkaj jaroj li havos tutan frukt-arbejon."

Infana logikeco.

Viĉjo: „Paĉjo, kio estas rapidvagonaro?”

Patro: „Tio estas vagonaro, kiu nenie haltas.”

Viĉjo: „Sed, paĉjo, kiel do la homoj en- kaj eliras?”

Malfacila demando.

La malgranda Petro devas aĉeti por sia patrino insektpulvoron. La drogisto demandas al li: „Ĉu vi volas havi por tridek aŭ kvindek?”

Petro respondas: „Mi kredas — — por ducent.”

Li pravis.

La lernejspektoro vizitas la lernejon. Li volas kontroli la scion de la infanoj, kaj faras diversajn demandojn. Al la malgranda Karlo li demandas: „Kiom da tagoj estas en jaro?”

„Sep”, estas la tuja respondo.

Ĉiuj infanoj laŭte ridas. La inspektoro diras: „Nu, bone pripensu! Mi demandis en jaro, ne en semajno!”

La malgranda Karlo restas tute trankvila kaj diras: „Jes, mi bone aŭdis, sed ja estas nur sep tagoj: dimanĉo, lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato. Nombro mem, estas precize sep! Pri aliaj tagoj la instruisto neniam rakontis al ni.”

Internacia lingvo.

Kelkaj eŭropanoj vizitis Ĉinuĵon. Iam ili en hotelo ricevis iom strangan viandaĵon. „Estas rostita ansero”, asertis unu el ili. La aliaj ne samopiniis kun li. Sed estis malfacila afero, ĉar ili ne parolis la ĉinan lingvon, do ili ne povis demandi al la kelnero. Kaj tiu kelnero ne komprenis la eŭropajn lingvojn. Post iom da priparolo ili ekhavis bonan ideon. Ili montris al la viando, rigardis per demandaj mienoj al la kelnero, kaj komencis krei kiel anseroj: kvak-kvak-kvak!

La ĉina kelnero tuj komprenis. Li skuis la kapon kaj bojis: vaŭ-vaŭ-vaŭ!

Rakontu la suprajn rakontojn per propraj vortoj.

Espero plej longe daŭras.

Tales estis greka filozofa. Li vivis en la 6-a jarcento antaŭ Kristo. Li estis tre saĝa homo. Al ĉiu demando li donis trafan respondon.

Iam oni demandis al li: „Kio estas la plej granda?”

Tales tuj respondis: „La spaco, ĉar ĝi ampleksas ĉion.”

„Kio estas la plej rapida?” — „La penso, ĉar dum palpebrumo de la okulo ĝi trakuras la tutan mondon.”

„Kio estas plej facila?” — „Doni konsilon al aliaj.”

„Kio estas plej malfacila?” — „Koni sin mem.”

„Kio estas la plej saĝa?” — „La tempo, ĉar ĝi instruas ĉion kaj efektivas ĉion.”

„Kio estas la plej forta?” — „La bezono, ĉar ĝi venkas ĉiajn malhelpojn.”

„Kio plej longe daŭras?” — „La espero, ĉar eĉ se la homo perdus ĉion, restus al li ankoraŭ la espero.”

El „Esperanto-Tidende”, junio-julio '41.

Interno kaj ekstero.

„Tio sufiĉas Silvia, vi manĝis jam tro multe da kuketoj! Vi estas tro malgranda por manĝi tiom!”

„Ho, paĉjo, mi ne estas tiom malgranda interne, kiom ekstere!”

Al la zoologia ĝardeno.

Je la 7-a horo ni jam staris ĉe la fino de la vilaĝo. Ni atendis la aŭtomobilon. Cis, mia fratineto, metis ĉion en la dorsosakon. Kaj kompreneble ni portis niajn TJO-insignojn. Kaj en la dorsosako estis la „Juna Vivo”-kantaroj. Tie jam estis la aŭtomobilo. Ni kantis, kaj baldaŭ ni estis en Purmerend. Ni estis dudekope. Ne estis bela vetero, ĉar pluis. Ni devis atendi unu horon por la tramo. Kiam ni fine sidis, ni ree kantis. Kaj ĉiuj homoj aŭskultis. Kaj ni estis tre gajaj. Tiam ni venis en Amsterdamo. Ni marŝis al la zoologia ĝardeno. Tie Wim v. d. Hoff aĉetis la biletojn, kaj ni iris al la bestoj. La simioj estis belaj, ankaŭ la leonoj. Unu homo ŝetis speguleton al simio. Kiom ni ridis! Je la 12a horo ni manĝis la buterpanojn. Ni ĉiuj ricevis boteleton da senbutera lakto aŭ

limonado. Mi manĝis kvar glaciaĵojn. Tiam ni ree iris al la bestoj. La posttagmezo tre rapide pasis. Baldaŭ ni ree iris al Purmerend. Tie ni atendis duonan horon. Tiam ree venis la aŭtomobilo, kaj ni iris hejmen. En Oost-Grafdijk ni eliris. Kaj ni diris, ke estis agrablega tago!

Telma Koppen (11-jara), O. Grafdijk, Ned.

Korektu la erarojn.

La sciencisto.

La filosofon Newton pripensis malfacila problemo. Pro tion li forgesis matenmanĝas. Sia virino sendis al li servisto kun ovo kaj akvuĵon. Li devis kuiras la ovon por la scienciston. Sed s-ro Newton deziris esti zola kaj forzendis la servisto. Li diris, ke li mem kuiras la ovo. La serviston ankoraŭ atentigis lian mastro, ke la ovo dum tri minutoj devas kuŝas en la bolanto akvo. Li metis horloĝo ĉe la akvuĵo kaj foriris. Sed post iom da tempon li ree iris al la laborĉambro de s-ro Newton, ĉar li timis, ke tiu forgesos kuiras la ovo. Kiam li envenis, li vola ne vola devis ridi: Ĉe la fornon staris Newton. Li ega pensis pri ion. En la dekstra mano li tenis ovo. La akvo bolis en la ujo kaj en ĝi kuis la horloĝon.

La ruza Frico.

Korektita ekzerco el la antaŭa numero: Frico estas saĝa knabeto. Kun la patrino li vizitas la onklinon. Frico devas promesi, ke li nenion petos por manĝi ĉe ŝi. Nun li sidas ĉe la onklino kaj la patrino tre vigle parolas kun ŝi. Ili ne havas tempon por la bubeto. Li ĝis nun ricevis eĉ ne unu peceton da ĉokolado. Kaj Frico tiom ege malsatas.

Subite li diras: „Onklino, ĉu vi malsatas?”

„Ne, karulo mia,” respondas la onklino kun miro.

„Ho,” ĝemas Frico, „se mi estus vi!”

Kaj li ricevas grandan pecon da ĉokolado.

Geamikoj, se vi pagos vian kotizon antaŭ la 15-a de julio vi multe plisimpligos nian administradon, kaj vi ŝparos al vi mem la enkasigajn kostojn. Bonvolu do plenumi nian afablan peton:

Pagu vian kotizon kiom eble plej baldaŭ!

Ĉiu Esperantisto posedu la Internacian Kantaron „La Juna Vivo”! Prezo nur f0,50 aŭ egalvaloro.

KORESPONDADRESOJ.

Britujo: 2 knabinoj (11- kaj 12-jaraj) dez. kor. angle kaj poste france kun samaĝuloj. J. C. D. Smith, 59 Reynolds Str., Burnley, Lancs.

Bulgarujo: S-ro Ivan Hristov, Metodi Kusević 18, Sofia, dez. kor.

Ĉinujo: 21-j. ĉino dez. kor. kun ĉiuj amikoj. Tre ŝatas literaturon. Adr: Zekun, 40, Ĉengtua Esperanto-Ligo, P. O. Box 77, Chengtu.

Franĉujo: (korekto): „La Kunuloj” el la Infanrespubliko de Bosuci (kastelo apud Parizo) dez. kor. Ili estas 8-10-15-j. Eldonas propran gazeton. Prefere kor. grupe. Adr. La Kunuloj de la Bastide de Beaux-Soucis, Maisons d'Enfants de l' Entraide Francaise, Fontennay les Briis.

Juna franco dez. korespondant(in)ojn el ĉiuj nacioj. R. Nouet, Brie par Oiron (2 Sèvres).

S-ro Lucien Loches, 63 Av. de Royat, Chamalieres (Puy-de Dôme), petas ilustritajn poŝtkartojn por sia kolekto. Respondo certa.

Mi interŝanĝas desegnaĵojn de lernantoj 10-17-jaraj kun la tuta mondo. Pialla, Nyons, Drôme.

Nederlando: Mi dez. kor. kun la tuta mondo per il. poŝtk. kaj interŝ. ĉiajn esperantaĵojn (ekz. propagandilojn, gazetojn, ktp.) Respondo garantiata. S-ro H. Wittenberg Jzn. „Ekeris” 381, Woudenberg (U).

Mi dez. kor. kun fraŭlino 16-18-jara el Aŭstralio. Adr: A. Blaauw (16-j.), Kilpad B 77, Heerhugowaard (NH).

F.ino Elsa Schünemann, apotekist-helpantino, Blyhamsterstr. 51, Winschoten, dez. kor. kun eksterlandanoj 30-40-jaraj.

F.ino Fien Brill, Yisschersdyk 391, Winschoten (28-j.) dez. kor. kun ĉiuj landoj.

RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

Unua Libera Kongreso de Bulgaraj Esperantistoj, Septembro '45. Raporto pri la 28-a Kongreso de la Bulgara Esperantistaro.

Islamo Esperantiste rigardata. Originale verkis Colin Evans. Islama Koresponda Rondo, 10 St. Philips Place, London W 2, Anglujo. — Preze afr. 10p.

Gaja Leganto per Esperanto: P. E. Schwerin. Eld. Esp. Publishing Co. 56-paĝa libreto, enhavanta kolekton da anekdotoj, vortludoj, ludoj por grup-vesperoj, ktp. Prezo: f 0,75, afrankite. Mendebila ĉe TJO-Centro.

Pli ol fantazio: Agnes Bogh-Hogsted, trad el la dana lingvo C. Graversen. 71-paĝa libro, prezo f 2,00 (afr.); mendebila ĉe TJO-Centro.

Jen bona verko, kun iu kvieta ĉarmo, kiun oni en nia bruoplena tempo plezure legos. La verko konsistas el 5 skizoj, kiuj respegulas ĉiajn homojn kaj homajn emojn kaj ecojn, kiajn ni renkontas en nia ĉiutaga vivo.

La ponto: Angel Karaliŝev. Elbulgarigis N. Vasilev. Eld. T. F. Ĉipev. Prezo f 0.20 (afrankite). Mendebila ĉe TJO-Centro.

Bonlingva rakonto, kun iom mistika enhavo. Fundamento de ĉi tiu rakonto estas la bulgara popolkredo: kiam oni ion konstruas, kiu estu fortika, oni enmasonu en ĝi la ombron de sia plej kara estaĵo.

Jarlibro de la Internacia Esperanto-Ligo 1946, unua parto. Nur por uzo de membroj.

	TJO	LJV
Aŭstrujo: Johann Leopold Germela, Thongasse 3/3/12, Wien III/40.		
Belgujo: C. Braet, Esscheboomstr. 1, Brugge, ĝiro 4770.86	40 fr.	24 fr.
Britujo: F.ino Rees, „Derwydd“, Seven Sisters, Neath, Glam. Wales	5 ŝil.	ŝ 3
Bulgarujo: Šterjo Z. Kukušev, Str. Michaeil 14, Peštera	125 lev.	75 lev.
Ceĥoslovakujo: Jaromír Jermár, Záběhlice Jablonová 23, Praha.		
Danujo: C. Jensen, Musikhuset, Nyköbing, F.	5 kr.	3 kr.
Finnlando: Svante Kivinen, Vipurinlääni, Kouvola ...	125 fmk.	75 fmk.
Francujo: S.ino Turin, Instruistino, Trépot, Doubs. Ĝironumero 287.02, Dijon.	100 fr.	70 fr.
Hispanujo: Octavio de Diego la Rosa, Baltazar Gracián 12-3°, Zaragoza	12 pes.	7 pes.
Italujo: Prof. Camuffo Armando, v. Bartolomeo, d'Alviano 4 IV, Trieste	215 L	130 L
Maroko: S.ino I. Fink, 5 rue de Savorgnan de Brazz, Casablanca	100 fr.	60 fr.
Nederlando: TJO-Centro, West-Graafdiik, ĝiro 382363	f 2,50	f 1,50
Portugalujo: A. P. da Silva, Quinta do Ferro, Rua B. No. 28—20 Dto, Lisbono	25 esk.	15 esk.
Norvegujo: Norv. Esp. Ligo, Box 942, Oslo	5 kr.	3 kr.
Skotlando: S-ro A. Gordon, 28 Holehouse Rd. Kilmarnock	5 ŝ	3 ŝ
Svedujo: K. E. Karlsson, Upplandsgatan 69 ¹ , Stóckholm, ĝironumero 252674	4 kr.	2½ kr.
Svisujo: Eugen Klee, Brasselmühle, Rheineck	4 fr.	2½ fr.

Oni povas pagi sian TJO-kotizon aŭ abonon je LJV per poŝtmarkoj neuzitaj. Sed nur per kompletaj serioj da neuzitaj poŝtmarkoj, kaj prefere novaj eldonoj. Sendu ilin rekte al la TJO-Centro.

Avo Joco rigardas. Rakonto pri la vivo de la bulgara popolo dum la unuaj jaroj post la liberigo de la kvincentjara turka jugo. Prezo 0,30 guld. Mendebla ĉe TJO-Centro.

„LA VERDA FLAMO”	PASO POST PASO
Monata gazeto kun artikoloj pri la vivo en Maroko, kaj pri la internacia movado. Enhavas krucvort-enigmajn, humoraĵojn, ktp. Abonantoj rajtas senpage enpresigi korespondadreson. Abonprezo 9 respondkuponoj. Adr: „La Verda Flamo, Casablanca, 5/II et. S. Brazza, Marokko.	Esperanto-Lernolibro verkita de J. W. Minke kaj F. Boom-de Vries eld. C. A. J. v. Dishoeck, Bussum Prezo: 1-a parto: f 0,80 2-a parto: f 1,— Mendeblaj ĉe TJO-Centro.